Ĉiuj Sanktuloj -1an de novembro 2009

ĜOJU KAJ RAVIĜU ĈAR VIA REKOMPENCO ESTOS GRANDA EN LA ĈIELO
– Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Mt.5, 1-10a

[En tiu tempo] vidinte la homamasojn, li supreniris sur la monton, kaj kiam li sidiĝis, liaj disĉiploj venis al li; kaj malferminte la buŝon, li instruis ilin, dirante:
Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.
Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar ili konsoliĝos.
Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron.
Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos.
Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton.
Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion.
Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj.
Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.
Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos kaj persekutos kaj false vin kalumnios pro mi.
Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo.

La evangeliisto skribas, en tiu kiu estas la ĉefverko en lia Evangelio, la 5° capito, la rakonto pri La surmonta prediko, ke "Jesuo, vidinte la homamasojn, supreniris sur la monton,", Jesuo ne malproksimiĝas de la homamasoj, sed ilin altiras sur la monton. "La monto" indikas la dian kondiĉon. Ne estas plu kiel en la malnova interligo, kiam ĉeestis la timo la teruro alproksimiĝi al Dio.

Nun fariĝis vivkondiĉo tiu de la alproksimiĝo al Dio."li supreniris sur la monton", la evangeliisto enmetas la difinitan artikolon kaj li indikas monton konatan, eĉ se li ne donas geografian indikon pri ĝi.Kio estas tiu "la monto? Ĝi estas konata monto. La evangeliisto volas bildigi per ĝi la monton Sinajon, kien Moseo supreniris por ricevi de Dio mem la interligon kun sia popolo. Tiam por la evangeliisto Jesuo mem supreniras sur la monton, ne por aliri al Dio, sed li, kiu estas Di, komunikas, proklamas la novan interligon kun sia popolo – fakte la evangeliisto jam difinis Jesuon "La Dio kun ni"-.

Li sidiĝis, tia estas la lokiĝo de la instruisto,"liaj disĉiploj venis al li", do, Jesuo altiras la homojn al la dia medio por komuniki al ili la dian vivon, kaj "malferminte la buŝon, li instruis ilin, dirante...".

Kaj ĉi tie estas la literatura, teologia, spirita ĉefverko de la Evangeliisto. Antaŭ ĉio la numero de la Feliĉoj, ili estas ok. Kial tiu ĉi numero? La numero ok en la simbologio de la praa kristanismo, indikis la resurekton, ĉar Jesuo resurektis la unuan tagon post ia semajnfino. Tiam, do, doni al tiuj Feliĉoj la numeron ok signifas ke la akcepto kaj la praktikado de tiu ĉi mesaĝo kondukas nin ĝis vivo kiu ne interrompiĝos per la morto.

Dum la observado de la ordonoj de Moseo sekurigis longan surteran vivon, la praktikado de tiuj Feliĉoj sekurigas vivon kiu ne interrompiĝos per la morto.

Sed ne nur tion li faris, la evangeliisto eĉ klopodis kalkuli per kiom da vortoj li komponos tiun ĉi "surmontan predikon", kaj en la greka teksto, ili estas ĝuste sepdek du, kiel la paganaj popoloj laŭ

la kalkulado kiu troviĝas en la libro "Genezo"en ĝia deka ĉapitro. Dum la dek ordonoj estis por la izraela popolo, la Feliĉoj estas por la tuta homaro.

Ni ne havas tempon por komentarii la tutajn Feliĉojn, sed la unua ne estis metita hazarde tien: ĝi estas la kondiĉo por ke ĉiuj la aliaj ekzistu. Jesuo nomas "Feliĉaj". Tiu termino (μακάριος) indikis la feliĉon de la dioj, neatingeblan feliĉon ĉi tie surtere. Nu, la volo de Dio kaj la invito de Jesuo estas ke eblas atingi ĉi tie dum la surtera vivo plenplenan feliĉon kiu similas al tiu de Dio , ne en la transmondo.

Kaj kiujn Li proklamas feliĉajn?"la malriĉajn en Spirito". Tie ekzistas tradukproblemo kaj interpretproblemo. La gramatikaj solvoj estas tri:

- "Malriĉaj", ĉar "mankaj" je Spirito. Ne eblas ke Jesuo proklamis feliĉajn la homojn... kiuj bezonas helpon, zorgojn, sed kiuj ne estas modeloj por la sinteno;

- La alia klarigo estas "malriĉaj en la Spirito", tio estas homoj kiuj, eĉ se ili posedas riĉaĵojn, ili estas spirite disigitaj de tiuj ĉi. Tion dementas la agado de Jesuo, kiu, kiam Li renkontas riĉulon ne petas de li ke li spirite seniĝu je la avaĵoj, sed ke li forlasu ilin konkrete kaj ĝisfund;.

- La tria ebleco estas "pro la Spirito". Nome Jesuo ne proklamas feliĉajn tiujn kiujn la socio igis povruloj, sed tiujn kiuj, libere kaj volonte, pro amo, eniras tiun kondiĉon de malriĉeco. Sed por kion fari? Certe ne por ke oni aldoniĝu al tiomaj, al troaj malriĉuloj kiujn la homaro kreis, sed por elimini la kialojn de la malriĉeco.

Jesuo ne petas ke oni senvestiĝu, Jesuo petas ke oni vestu la aliajn. Jesuo petas: ***"malpliigu iomete vian vivnivelon por permesi al tiuj kiuj ĝin havas tro malpliigitan ĝin altigi jomete".*** *Do, Jesuo diras ke kiuj, libere kaj memvole, pro amo, estas je dispono por kundividi kion ili havas kaj kio ili estas – ĉar pri tio temas - ili estas plene "feliĉaj". Kial? "Ĉar ilia Estas" – Li ne uzas verbon en estonta formo, li ne diras estos, sed li uzas la prezencan formon - " la regno de la Ĉielo".*

En la pasinteco, la miskompreno de tiu esprimmaniero, kiu estas tipa kaj aparta en la Evangelio laŭ Sankta Mateo, kondukis al la fremdigo de tiu mesaĝo, t.e. "feliĉaj la povruloj ĉar ili eniros la paradizon". Absolute ne temas pri io tia. "Regno de la ĉielo" estas esprimmaniero uzita de Sankta Mateo, kiu, kiam eblas uzas anstataŭantajn nomoj por Dio, pro respektemo al lia komunumo, konsistanta el judoj, kiuj, ne nur ne nomas Dion, sed eĉ ne skribas Lian nomon. Kaj "ĉielo estas unu el tiuj terminoj, kiel ankaŭ ni diras "danke al ĉielo" en nia gepatra lingvo, la itala, ni certe ne dankas la atmosfero , ni dankas Dion.

*Tiam "Regno de la Ĉielo" signifas "Regno de Dio". Sed kion signifas la Regno de Dio? Ĝi ne estas geografia spaco. Ĝi estas la loko kie Dio regas la siaj. Tiam la evangeliisto estas prezentanta al ni tiun eksterordinare belan mesaĝon de Jesuo - ĉar la mesaĝo ne direktiĝas al ununura homo, sed al komunumo: "****se vi, libere kaj memvole, pro amo, vin sentas respondeca je la feliĉo de la aliuloj, estu feliĉaj! Kial? Ĉar vi permesos al Dio, al la Patro, respondeci je via feliĉo.***

Estos la Patro kiu prizorgos vin. Tiam Jesuo nin sekurigas ke estas eble esti plene feliĉaj, ĉi tie dum nia surtera vivo. Estas entenata en la Agoj de la Apostoloj lia esprimo, kie Jesuo diras: "Oni estas pli ĝoja donante ol ricevante". La ĝojo ne konsistas el kio oni havas, sed ĝi konsistas el kio oni donas. Do, des pli oni donacas al aliulo ju pli oni estas plene ĝoja.

Tiu estas la kondiĉo por ke poste ĉeestu ĉiuj la aliaj Feliĉoj.